




tejo
tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

***Nova
raporto
pri la
TEJO-
agado!***



**Jara
Raporto de
TEJO 2009**

**Rezolucio de
la IJK en
Liberec'**

**IJK 2011:
ĉu ĉe vi?**



*Saluton!
Jen mia unua
numero kaj, malkiel
mi antaŭvidis, ĝi
aperas malfruege;
la kaŭzoj estas
tamen tute
personaj, miaj, pro
relative grandaj
eventoj en mia
laborvivo, ĉar por
tiu ĉi numero tute*

*ne mankis kontribuoj (eĉ kelkajn mi
devis enmeti en la venontan numeron kiu
espereble aperos akurate). Mi do bedaŭras
pro la malfruo kaj la eventualaj koboldoj
kiuj kredeble malkaŝos sin tra la paĝoj.
Mi ŝatas nun bonvenigi la novajn
individaŭajn membrojn de TEJO kaj amike
invitas ankaŭ ilin legi la jaran raporton
por havi ian ideon pri la freŝaj agadoj de
nia organizo kaj, en ebla okazo, kontribui
praktike: eĉ simpla aliĝo al Pasporta
Servo estas grava helpo!
Tiu ĉi numeron okupas grandaparte nur
la Jara Raporto de TEJO, sed vi povos
ankaŭ legi la rezolucion de la lasta IJK en
Liberec' (Ĉeĥio). Ĉi-rilate, mi bonvenigas
diskutojn pri ĝi en la venontaj numeroj de
TEJO Tutmonde.
Nun mi diros kelkajn vortojn pri mia*

*redakto-stilo: ĝenerale ĝi estos la sama de
miaj antaŭuloj, sed mi ŝatus plintensigi la
raportojn de ekstereŭropaj aktivuloj kiuj
foje mirindas pro originaleco kaj fantazio;
tial, mi esperas ke iuj el vi kontaktos la
redakcion por konstanta helpado.
Fine, mi volas nome de TEJO danki mian
antaŭulon Marcos CRAMER kaj
samtempe gratuli lin kaj lian edzinon pro
la bebo ĵus havita!
Mi esperas ke vi ĉiuj ĝuos la legadon de
tiu ĉi numero!*

Nicola

Enhavo

TEJO-jarraporto 2009-2009.....	3-17
Kongresa Rezolucio de IJK en Liberec' 2009.....	18
Alvoko por IJK 2011.....	19
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO.....	20

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Nicola RUGGIERO), Hátún 9, 105 Reykjavík, Islando. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton.

Redaktisto: **Nicola RUGGIERO** (Islando). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Jara raporto de TEJO-estraro kaj -komisiitoj 2009

kompilita de Anna-Laura Haber WICKSTRØM, ĝenerala sekretario

1 Antaŭparolo

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, ĝenerala sekretario

Tenas vi en viaj manoj la jarraporton 2009. Efektive temas pri raporto de unu jaro da TEJO-laboro, komenciĝante je la IJK 2008 en Szombathely, Hungario, kaj daŭriĝante ĝis la komenco de la IJK 2009 en Liberec, Ĉeĥio.

Temas pri la unua plena jaro de la nuna Estraro de TEJO – kaj multe estas prezentinda pri la fruktoj de la jaro. Jam la unua paĝo de tiu ĉi raporto montras novan emblemon de nia organizo; novan aspekton ankaŭ ricevis nia revuo *Kontakto*. Sed ne nur nova aspekto prezentindas, ankaŭ modernigo estis grava parto de nia laboro, jen kelkaj gustotoj: la populara *Pasporta Servo* ‘konkeris’ la interretan mondon, la Komitato ricevis retan voĉdonsistemon, KODEJO estas reta servo por plifaciligi la administradon de la Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO, ktp.

La Estraro aldone antaŭenpaŝis al videbligo de sia laboro – daŭrigo de la laboro de David-Emil Wickstrøm el la antaŭa Estraro – kaj nun atingas siajn membrojn tra la estrara blogo kaj serio ‘Rekte el la Estraro’ en *TEJO Tutmonde*.

La laboro por TEJO postulas multe da tempo kaj ni daŭre rimarkis ke ne mankas ideoj, sed homforto por realigi la ideojn. La Estraro kaj komisiitoj de TEJO investis

tiom da tempo kaj energio kiel ili povis (kaj foje eĉ pli) por la organizo kaj atendas helpon kaj komprenemon de siaj membroj por plenigitaj taskoj.

2 Enkonduko

raportas Gregor Hinker, prezidanto, estrarano pri KER

Inter ĉiuj aktivecoj de TEJO la konstantaj estas la plej postulemaj je tempo kaj energio: La Internacia Junulara Kongreso (IJK), la eldonoj de la revuo *Kontakto* kaj de la membrogazeto *TEJO Tutmonde*; la administrado de la membroj. TEJO estas organizo kiu fiere posedas tradicion de aktivecoj (pri kiuj vi legos en la individuaj kontribuoj de la Estraranoj), kies plenumo ‘formanĝas’ la plimulton de la disponeblaj homfortoj. Dum la pasinta jaro ni ĉiuj forte spertis kiomgrade tio limigas la potencialon je novaj iniciatoj.

Dum tiu ĉi periodo la necesaj kondiĉoj por dungo de (plej verŝajne parttempa) TEJO-oficisto en la Centra Oficejo estas plenumitaj por la unua fojo kaj permesas konkretajn paŝojn por la komenco de la venonta periodo. Ni esperas ke ni bone preparis la terenon por la grava paŝo en la direkton ‘profesiigo tie kie bezonatas’ per dungo de TEJO-oficisto:

- Profesinivela administrado de financado kaj subvencipetoj malŝarĝos la Estraron kaj la koncernatajn projektpartnerojn.
- Kunlaboro en la administrado de

membroj kaj en la efektivigo de konstantaj ripetantaj procedoj pliefikigos la laboron de la volontulo kaj la Estraro.

Revizante la pasintan jaron, ni devas konstati ke pluraj penoj niaj restis senfruktaj. Ĉefe, niaj klopodoj organizi seminariojn malsukcesis pro nericevo de subvencioj en pli kaj pli malfacila 'subvenci-merkato'.

Tamen, ni ĝojas ke inter la IJK-oj 2008 kaj 2009 pluraj projektoj konkretiĝis kaj efektiviĝis:

- La projekto 'grafika identeco de TEJO' serioze antaŭenpaŝis per la enkonduko de nova emblemo kaj la preparlaboroj por propra TEJO-UEA-membrokarto.
- La debaza renovigo de *Pasporta Servo* (nun plene prezenta en la retpaĝaro www.pasportaservo.org) estis la plej tempopostula kaj kosta projekto.

3 Administrado

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, ĝenerala sekretario

La Estraro de TEJO daŭrigis kun la samaj personoj: Gregor Hinker (Prezidanto, KER), Anna-Laura H. Wickstrøm (Ĝenerala Sekretario), Sergej Tyrin (Kasisto, dua vicprezidanto), Rogener Pavinski (Landa Agado, tria vicprezidanto), Vildana Delalić (IJK, unua vicprezidanto).

La Estraro dekonufoje renkontiĝis en Reta Estrarkunveno (en septembro, oktobro, novembro, decembro, januaro, du foje en februaro, marto, majo, junio (planita), kaj julio (planita) kaj fizike kunvenis dufoje por tritaga estrarkunveno en la CO – en novembro 2008 kaj en majo 2009.

Pri la laboro de la Estraro ĉiu estrarano

regule raportis al la Komitato en la monata retrevuo *Komitata Cirkulero*. Aldone ekde aprilo 2009 la Estraro skribas pri siaj aktivaĵoj en sia blogo ĉe <http://www.tejo.org/blogo/Estraro> kaj ekde la tria numero de *TEJO Tutmonde* la Estraro ankaŭ aperigas serion 'Rekte el la Estraro'.

Bedaŭrinde la komisiono pri reta informado (KRETA) iĝis senkapa, kaj lasis grandan truon en la subteno kaj aktualigado de la reta apero de la organizo, sed samtempe ni ĝojas anonci, ke la dum iom da tempo vaka posteno de komisiito pri la reta revuo *TEJO-aktuale* nun estas transprenita de Julia Noe, iama TEJO-volontulo.

La redaktoro de *Kontakto* daŭrigis sian laboron, kaj lia teamo kreskis per la bonvenigo de grafikisto Lucas Vignoli Reis. La revuo estas en renoviĝanta fazo, kiu ankoraŭ ne atingis la finon, sed espereble baldaŭ estos denove moderna revuo sen malfruo.

La redaktoro de *TEJO Tutmonde* Marcos Cramer transdonis sian postenon al Nicola Ruggiero post la tria numero de 2009. Ni kore dankas al Marcos pro interesaj gazetoj kaj akurata kaj ĉiam tre plezura kunlaboro, kaj bonvenigas Nicola en nian teamon kaj ĝojas pri daŭrigo de la bona laboro de Marcos.

En novembro 2008 Julia Noe transdonis sian postenon kiel TEJO-volontulo en la CO al Federico Faccio Peláez. Federico pro personaj kialoj jam en majo ĉesis sian laboron en la CO. Ĝoje por ĉiuj Paŭlo Ebermann pretis lastminute transpreni la laboron de Federico, kaj tiel eblis eviti vakan postenon en la oficejo, kie tuttempa laboristo necesas. Ni dankas al Julia kaj

Federico pro bona kaj akurata laboro. Estis plezuro labori kun ili.

Menciindas ke Paŭlo ene de unu semajno pretis translokiĝi al nova lando kaj transpreni unu el la plej gravaj postenoj ene de nia organizo – li meritas laŭdon eksterordinaran pro tia disponeco.

La Komitato de TEJO havis kvar laborsesiojn dum la IJK en Szombathely, Hungario. La protokolo troviĝas je tejo.org/eo/Komitato/protokolo2008.

Maksimume, ni havis 23 voĉojn kaj partoprenis gastoj sen voĉoj. La komitatanoj elektis komitatanon C Heming Welde Thorbjørnsen, taskigis la Estraron trovi programiston por verki retan version de *Pasporta Servo* kaj okazigi seminarion en 2009 laŭ propono de laborgrupo kaj akceptis JEBUO-n (Junulara Esperantista Burundia Organizo) kiel Landa Sekcio de TEJO. La Komitato aprobis la Jaran Raporton 2007-2008, la laborplanon de la Estraro por la jaro 2008, la financon jarraporton por la jaro 2007 kaj la proponon por reta voĉdonado.

La voĉdona sistemo por la Komitato estis programita de Tom Juval. Ni ĝojas pri tre efika, sekura kaj facile uzebla sistemo kaj dankas al Tom pro lia laboro. En aprilo Anna-Laura enkondukis la sistemon al la Komitato kaj iniciatis plurajn provvoĉdonojn por ke la Komitato povu konatiĝi kun la nova sistemo. Bedaŭrinde tri komitatanoj ne partoprenis la provojn kaj nek la koncernaj komitatanoj nek iliaj landaj respektive Fakaj Sekcioj respondis al komunikado rilate al la reta voĉdonsistemo. Pro tio ni devas atendi la komitatan periodon 2009–2011 por enkonduki la retan voĉdonsistemon kiel demokrata voĉdonsistemo de la Komitato

ekster la komitataj kunvenoj.

Por la periodo 2007–2010 TEJO-n en la UEA-Komitato reprezentos Peter Balaž kaj Haris Subašić (ĝis 2009) kaj Nico Huurman (2009–2010).

4 Membroj

raportas Anna-Laura H. Wickstrøm, ĝenerala sekretario

En la suba tabelo 1 ni vidas, ke la kvanto de individuaj membroj de TEJO kreskis en 2008. Tamen, por havi pli justan komparon estas aldonita la datumo de 2006. En 2007 la plej grandaj malkreskoj troviĝas ĉe eŭropaj landaj sekcioj (LS-oj) (vidu tabelo 3), tio ŝajnas rilati al la neeŭropa IJK. Ĉar granda parto de (iamaj) TEJO-membroj loĝas en Eŭropo, tio malhelpas la (re)membriĝadon. Pro tio la kvanto de membroj kreskis en 2008, sed kompare al 2006 TEJO ja spertas malkreskon de membronombro.

Tamen la malkresko ankaŭ estas indiko, ke inter niaj 1926 (en 2007: 1985) aligitaj membroj, nur malmultaj scias pri sia tegmenta organizo.

En 2008 la individuaj membroj de TEJO sin indikis kiel loĝantoj de 77 ŝtatoj (74 ŝtatoj kaj unu senŝtata en 2007; 77 ŝtatoj en 2006).

Membro-kategorio	Kodo
Junaj Membroj kun Jarlibro	MJ-T
Junaj Membroj-Abonantoj (+revuoEo)	MA(T)
Junaj Dumvivaj Membroj	DMT
Junaj Dumvivaj Membroj kun jarlibro	DMJ(T)
Sumo Individuaj Membroj	IM
Dumvivaj Patronoj	DPT
Unujaraj patronoj	PT

Kodo	2008	2007	2006	2005	2004	2003	2002	2001	2000	1999	1998	1997
MJ-T	298	229	342	361	267	231	235	337	350	451	451	598
MA(T)	133	128	132	131	137	139	161	201	241	220	260	277
DMT	22	24	25	24	24	23	18	19	19	17	17	17
DMJ(T)	11	13	16	13	15	6	5					
IM	469	393	515	529	443	399	419	557	610	688	728	892
DPT	22	22	21	21	21	18	17	17	17	14	13	12
PT	66	60	64	64	76	81	82	90	94	96	100	101

Lando	2008	'07	'06	Δ	08-07	Δ	08-06
Afganio	2	2	1		0		1
Algerio	2	1	1		1		1
Andoro	0	0	1		0		-1
Argentino	4	4	3		0		1
Armenio	0	0	1		0		-1
Aŭstralio	2	5	1		-3		1
Aŭstrio	6	4	6		2		0
Belgio	11	10	14		1		-3
Benino	3	3	1		0		2
Bjelorusio	1	1	1		0		0
Bosnio-Hercegovino	2	2	7		0		-5
Brazilo	23	22	26		1		-3
Britio	11	8	15		3		-4
Bulgario	3	3	4		0		-1
Burundo	3	1	1		2		2
Cado	2	1	1		1		1
Ĉeĥio	8	4	7		4		1
Ĉilio	2	3	2		-1		0
Ĉinio	3	4	3		-1		0
Danio	6	6	8		0		-2
Dominika Resp.	1	1	1		0		0
Ekvadoro	0	0	0		0		0
Estonio	1	1	2		0		-1
Finnlando	6	7	8		-1		-2
Francio	31	27	49		4		-18
Ganao	1	0	1		1		0
Germanio	41	29	40		12		1
Gvatemalo	1	0	0		1		1
Hispanio	6	4	22		2		-16
Hungario	14	6	14		8		0
Indonezio	1	0	0		1		1
Irano	9	9	8		0		1
Irlando	0	1	1		-1		-1
Islando	2	1	1		1		1
Israelo	8	10	11		-2		-3
Italio	10	10	19		0		-9
Japanio	9	37	12		-28		-3
Jordanio	1	1	1		0		0
Kanado	3	3	2		0		1
Kazaĥio	4	4	4		0		0
Kirgizio	1	1	0		0		1
Kolombio	1	1	1		0		0
Kongo, DR	1	4	0		-3		1
Korea Resp.	2	0	0		2		2
Kostariko	1	0	2		1		-1
Kroatio	7	3	10		4		-3
Kubo	3	3	3		0		0
Latvio	1	1	1		0		0
Litovio	7	3	5		4		2

Lando	2008	'07	'06	Δ	08-07	Δ	08-06
Madagaskaro	9	3	7		6		2
Makedonio	1	0	0		1		1
Malavio	0	2	5		-2		-5
Malio	1	0	0		1		1
Meksiko	4	5	8		-1		-4
Moldavio	4	4	3		0		1
Mongolio	0	1	2		-1		-2
Nederlando	13	9	13		4		0
Nepalo	0	0	2		0		-2
Nigerio	3	1	2		2		1
Nigero	1	1	4		0		-3
Norvegio	5	1	3		4		2
Nov-Zelando	1	1	0		0		1
Panamo	0	0	1		0		-1
Peruo	3	1	1		2		2
Pollando	18	5	14		13		4
Portugaliao	0	0	2		0		-2
Rumanio	1	1	1		0		0
Rusio	61	26	38		35		23
Salvadoro	1	1	1		0		0
Senŝtata	0	1	0		-1		0
Serbio	5	3	5		2		0
Slovakio	7	7	4		0		3
Slovenio	2	1	3		1		-1
Srilanko	1	1	0		0		1
Sud-Afriko	0	1	1		-1		-1
Sud-Koreio	0	0	2		0		-2
Svedio	11	14	11		-3		0
Svislando	5	4	6		1		-1
Tagikio	4	3	3		1		1
Tajlando	1	1	0		0		1
Tajvano	1	4	7		-3		-6
Tanzanio	0	1	1		-1		-1
Togolando	4	5	5		-1		-1
Tunizio	1	1	0		0		1
Turkio	0	0	0		0		0
Ugando	1	0	0		1		1
Ukrainio	10	5	6		5		4
Unuiĝintaj Arab. Emiratoj	0	0	1		0		-1
Urugvajo	1	1	1		0		0
Usono	12	13	20		-1		-8
Venezuelo	2	1	1		1		1
Vjetnamio	8	13	9		-5		-1
Sume	469	393	515		76		-46

5 Financoj

raportas Sergio Tyrin, kasisto

Mi transprenis la oficon de mia antaŭulino, Katja Ignatieva, en januaro 2008, kaj kun ŝia daŭra helpo kaj gvidado ekstrejniĝis en la diversaj financaj taskoj. Tamen, la lernado pludaŭras kaj la sento dum la tuta antaŭa jaro estis tiu de trejnperiodo. Al la amplekso de la taskaro aldoniĝas ne nur la manpleno de konendaj detaloj, sed ankaŭ la neceso labori kun diversaj eksteraj instancoj, ĉiu el kiuj havas siajn konceptojn kaj postulas konon de pluraj etaj ‘bagatelaĵoj’ (kiuj povas tre influi akcepton aŭ malakcepton de dokumentoj ekzemple).

Ĉar la spertiĝprocedo pri la kasista ofico do estas tiom longa kaj detaloplena, mi forte eksubtenis la ideon de persono konstante laboranta por TEJO, inter kies profesiaj kampoj estu traktado de financoj. TEJO nuntempe eklaboris serioze ĉi-direkten kaj kiam tia ofico efektiviĝos, la organizo povos multe pli efike kaj sukcese trakti subvencipetojn kaj monan subtenon al multoble pli da projektoj ol nun.

Lastjare la Estraro ekis plistrukturigi la fondaĵon Partoprenu IJK-n kaj la kandidatiĝprocedon. Mi gvidis tiujn paŝojn, informiĝinte pri la decidoj de la antaŭaj Estraroj pri la fontoj de la fondaĵo kaj ĝiaj reguloj; ĉi-jare la estrarano pri Landa Agado, Rogener, transprenis la organizan torĉon kaj kiel rezulto aperas nun detala laborskemo kun klaraj pripensitaj limdatoj.

Kadre de la preparado de la venontjara IJK, estis decidite instigi kaj finance apogi la partoprenon de la prezidanto de LKK, Ariadna García Gutiérrez, en la IJK en

Liberec. Ariadna plispertiĝos pri la organiza taskaro kaj sekvos deproksime la laboron de la ĉeĥa-germana-pola skipo surloke.

Inter la subvencipetoj faritaj lastjare estas peto al Eŭropa Junulara Fonduso pri du sinsekvaj seminarioj ‘Aktivula trejnado – spertiĝo en event-organizado’, kiu ne estis akceptita – sed ĉi-jare ni provos refari ĝin; peto pri la projekto *Pasporta Servo 2.0*, kies aprobo donis al TEJO la ŝancon efektiviĝi la tiom bezonatan (kaj komisiitan de la Komitato) renovigon de la servo en efika kaj fruktodona maniero; kaj administra peto al Junulara Fonduso de la Eŭropa Komisiono (programo ‘Youth in Action’) kiu same estis plene akceptita kaj ebligis al TEJO havi pozitivan rezulton fine de 2009.

Ekkompreno de la subvencipeta procedo, kono de la limdatoj kaj de la aro de necesaj dokumentoj espereble gvidos al pli efika kaj sukcesa traktado ĉi-jare kaj en la postaj jaroj, ĉar diverskampaj trejnseminarioj estas unu el la plej gravaj taskoj de TEJO kiuj bedaŭrinde estas malfacile efektiveblaj sen la financa apogo de eŭropaj institutoj. Abundo de renkontiĝoj estus la plej bela servo de la organizo al la junaj geaktivuloj, kaj tion la Estraro klopodu atingi jam en la dua duono de 2009.

Ekde aprilo 2009, la poŝmono de TEJO-volontulo estis altigita de 100 eŭroj semajne al 115 eŭroj semajne, kaj krome la Estraro decidis ĉiujare alĝustigi ĝin tiel ke la valoro restu samnivela, pro inflacio. La lasta altigo de la poŝmono de TEJO-volontulo okazis en 2002.

6 Landa Agado

raportas Rogener Pavinski, estrarano pri Landa Agado

En tiu nun plena jaro de estrara posteno estas multaj la raportindaĵoj pri Landa Agado de TEJO, jen la ĉefaj eroj.

6.1 Novaj Landaj Sekcioj

Junulara Esperantista Burundia Organizo (JEBUO) estis akceptita kiel nova Landa Sekcio pasintjare dum la IJK en Szombathely, Hungario. Ĉi-jare ni ricevis peton el Esperanto-Junularo de Benino (BOJE) por esti akceptita kiel Landa Sekcio de TEJO en Afriko. Ĝia kandidatiĝo estos traktita dum la komitata kunveno en Liberec dum la IJK.

Mankis iom pli forta kontakto kun aliaj malfortaj landaj sekcioj kaj formiĝantaj landaj junularaj organizoj, kiuj bezonas esti rigardataj de pli proksime. Kvankam mi mem plurfoje estis en kontakto kun aktivuloj el kelkaj junularaj organizoj kaj vekiĝantaj landaj sekcioj, ni esperas ke plia kunlaboro kun la komisiitoj de Landa Agado en kvar kontinentoj povas fari ke tia tasko estu pli efika de nun.

6.2 Komisionoj pri Landa Agado

La komisionoj pri Landa Agado estis restarigitaj kun la nomumo de novaj komisiitoj por Ameriko, Afriko, Azio kaj Eŭropo. Estis kreitaj por ili kaj ties junularo kvar novaj retdiskutlistoj, kiuj parte tre bone disvolviĝis – en la Afrika listo estis interŝanĝitaj 223 mesaĝoj kaj en la Amerika 45 mesaĝoj ekde septembro, kiam ili estis kreitaj kaj komence de junio, kiam mi verkis la raporton. La adresojn de la listoj vi trovas ĉe:

www.tejo.org/eo/dissendolistoj.

Nur la komisiono por Eŭropo pro diversaj kialoj bedaŭrinde ne vere aktivis. Sed necesas do trovi novajn eŭropajn komisiitojn, ĉar kelkaj LS-oj en Eŭropo ja bezonas instigon por revigligi. Pere de la komisiitoj la kontakto kaj informfluo el TEJO kaj tra la junularaj organizoj okazas pli facile, ĉar ne eblus ke sole, la estrarano pri Landa Agado havu superrigardon pri la okazaĵoj en la movado en tiel diversaj partoj de la mondo. Je la fino mi prezentas la raportojn de la komisiitoj.

6.3 Partoprenu IJK-n

La konkurso Partoprenu IJK-n estas unu el niaj kernaj servoj. Pro tio ni strebis puŝi ĝin al profesia nivelo de organizeco kaj klareco je elektado de la kandidatoj.

Ene de la Estraro, la estrarano pri Landa Agado prenis la respondecon zorgi pri la konkurso, tiel ke ni ekverkis manlibron por ke venontaj Estraroj havu ĉiujn informojn pri ĝi en unu sola dokumento. Ĝis nun mankis tia informkompilo kaj pro tio estis iom malfacile bone organizi la konkurson.

Ankaŭ ni kreis aliĝilon por la konkurso por normigi la prezenton kaj informojn, kiujn ĉiu kandidato sendas. Alia novaĵo, kiu bone funkciis, estis la propono ke la kandidatiĝoj estu aljuĝitaj kaj poentitaj laŭ jenaj kriterioj: aktiveco en landa/regiona/loka junulara organizo, potenciala instigo al aktiveco por aliaj en sia landa juna organizaĵo, potenciala aktiveco en TEJO kaj graveco de kontribuo al IJK-programo. Ricevas bonusajn poentojn kandidatoj laŭ siaj landkategorioj kaj tiuj, kiuj neniam antaŭe

partoprenis IJK-n.

6.4 KODEJO

Fine de la pasinta jaro, Landa Agado de TEJO lanĉis demandaron al siaj landaj sekcioj kaj aliaj junularaj organizoj. Ĝi nomiĝas KODEJO (KOMpleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj) kaj ĝi estas nova versio ĝisdatigita surbaze de malnova demandaro nomata ALSTOM (Agado de Landaj Sekcioj en TeJO-Mondo). Pere de ĝi ni celis kolekti gravajn infomojn de la junularaj organizoj de nia movado.

Ĝi kolektas unue la informojn, kiuj ĉiam devas esti ĝisdataj por nia datumbazo kaj por la jarlibro de UEA, kiel aktuala Estraro, aktualaj kontakt-informoj, ktp. Due, ĝi provizas aliajn interesajn informojn, kiuj ebligas al ni havi superrigardon pri la funkciado de niaj landaj sekcioj, i.a. pri la kotiz-sistemo, pri estrar-periodo kaj la rilato kun siaj nejunularaj tegmentaj organizoj.

La demandaro estis kreita kaj estis alirebla per reto en TEJO-retpaĝo. La reprezentantoj de la junularaj organizoj povis ĝin plenigi, kaj respondoj tuj eniris nian datumbazon.

El niaj kvardek kvin landaj sekcioj (LS-oj), nur dek naŭ plenigis la demandaron. Per tiu ĉi unua datumo, oni povas atesti ke ja multaj landaj sekcioj malaktivis. El tiuj, kiuj respondis, pri la stato de sia organizo, la respondoj estis jenaj: dek unu aktivaj (ĈEJ, SKEJ, IEJ, PEJ, GEJ, JEBUO, JEFO, BEJO, NJE, JEJ, FLEJA) unu dormanta (FEJO), sep vekigantaj (KEJ, JOTE, IREJO, NEJ, KEJA, JEB, JELI).

Ni kredas ke la rezultoj de KODEJO certe

povas helpi niajn LS-oj plifortiĝi en siaj agadoj kaj strategioj pere la komparo kaj diskuto de la informoj prezentitaj ĉi tie. La kompleta superrigado pri KODEJO troviĝas en la TEJO-vikio: tejo.org/vikio/Superrigardo_Pri_KODEJO_2008

6.5 Komisiitoj pri Landa Agado:

6.5.1 Azia komisiito de TEJO

raportas Song Ho-young

Song Ho-young listigas la ĉefajn junularajn okazaĵojn en Azio:

- Japana Esperanto-Junularo (JEJ) organizis la programon ‘Ni iru al IJK’ por instigi japanajn junulojn partopreni en la 64-a IJK.
- Korea Esperanto-Junularo (KEJ) lanĉis novan subvencisistemon por junuloj.
- JEJ okazigis la 27-an Komunan Seminarion en Jokohamo, Japanio. La 28-a okazos en decembro 2009 en Nankino, Ĉinio. (http://eo.wikipedia.org/wiki/Komuna_Seminario).
- KEJ kaj JEJ kunlabore kompletigis statistikojn pri ĝisnunaj Komunaj Seminarioj.
- Nepala Esperantista Junulara Organizo (NEJO) ekklopodas rekonstrui la organizon, kiu longan tempon dormetis post forpaso de Apsana GIRI.
- Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) planas organizi junularan renkontiĝon feste al miljariĝo de fondo de la urbo Hanojo. KEJ kaj JEJ konsideras ‘la ekstran Komunan Seminarion’ okazontan paralele kun tiu aranĝo.
- La 1-a Junulara Seminario (JS) okazis en

Harbino, Ĉinio.

6.5.2 Afrika komisiito de TEJO raportas Jérémie Sabiyumva

Jérémie Sabiyumva listigas sube siajn ĉefajn farojn en Afriko:

- Kolektis retadresojn kaj instigis junajn aktivulojn aliĝi al la retlisto TEJO-Afriko.
- Klopodis reaktivigi Kongan TEJO-sekcion.
- Korespondis kun aliaj afrikaj landoj (Sudafriko, Tanzanio kaj Benino) por starigo kaj plifortigo de la junulara organizo en tiuj landoj.
- Korespondis kun membroj de aktivaj afrikaj junularaj organizoj kiel JEBUO en Burundo kaj Togolanda Junularo Organizo pri diversaj strategioj por plifortigi la movadon inter afrikaj junuloj kaj lernejoj.
- Proponis al Afrika komisiono okazigi Afrikan Junularan kongreson.
- Korespondis en la retlisto pri la okazigo de IJK en Afriko.

6.5.3 Amerika komisiito de TEJO raportas Rodrigo Cyrino

Dum miaj malmultaj monatoj en tiu tasko, mia ĉefa agado estis persone kontakti kaj babili kun amerikaj gejunuloj por klarigi pri TEJO. En la listo TEJO-Ameriko mi multe aktivis, ade serĉis junulojn, invitis multajn, sed la multaj eĉ ne respondis, tioma estas malaktiveco en kelkaj grupoj. Ekster la listo, mi lastatempe ankaŭ havis personajn kontaktojn kun la kuba junularo. Kvankam nia ideo estis kunigi ĉion en la listo, kaj tie fari pli bonkvalitan diskutaron, ni ankoraŭ havas iujn barojn.

Necesas do esplori pli funde la kialon de tia malaktiveco kaj pli aktive reklami kaj informi pri TEJO. Ankaŭ tre bonvenos ekhavi seminarion aŭ iun specifan agadon de TEJO en Sudameriko por engaĝigi la homojn en iun specifan celon por komuna laboro.

7 Eksteraj rilatoj **raportas Gregor Hinker, estrarano pri KER, prezidanto**

7.1 Enmovadaj rilatoj

TEJO havas interkonsenton pri reciproka Estrara informfluo kun ILEI kaj UEA. Ĉiu Estraro nomumas reprezentanton kiu kunlegas la Estrarajn dissendolistojn de la aliaj kaj laŭbezone intervenas; cetero la reprezentantoj ĉeestas la kunvenojn de la Estraroj.

Tiel, mi reprezentis TEJO-n en la kunveno de la Estraroj de ILEI (Krakovo, nov. 2008) kaj UEA (Roterdamo, aprilo 2009). Reciproke, Loes Demmendaal kiel reprezentanto de UEA kaj Osmo Buller, ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo, partoprenis en ĉiuj kunvenoj de la Estraro de TEJO.

7.2 Ekstermovadaj rilatoj, KER

Bedaŭrinde, la *Komisiono por Eksteraj Rilatoj* proksimume 2007 ĉesis ekzisti kiel (kunlabore kun la Estraro) aŭtonome aganta laborgrupo. Klopodoj restarigi ĝin espereble dum la IJK 2009 rezultos en nomumo de komisiito pri eksteraj rilatoj kun teamo de kunlaborantoj. Pro tempokoincido kun la Estrarkunveno, ĉeesto de la FOJE-kunveno 2009 ne estis ebla.

retajn estrarajn kunsidojn.

8 IJK

raportas Vildana Delalić, estrarano pri kongresoj, seminarioj kaj Aktivula Trejnado

La Estraro, en kiu mi anas, komencis sian agadon jam antaŭ pluraj monatoj. Mi, kiel estrarano, klopodis fari miajn kontribuojn, kies resumon mi prezentos.

En pasinta jaro mi partoprenis IJK-n en Szombathely, kie mi ĉeestis ĉiujn estrarajn kaj komitatajn kunsidojn, kaj helpis organizi TEJO-vesperon. Post la IJK, kune kun aliaj estraranoj mi analizis la kongreson kaj faris finajn aprobojn kaj raportojn.

Venis tempo por serĉi aliajn kandidatojn, kaj post ricevo de kandidatiĝoj, kaj kune kun aliaj estraranoj mi partoprenis en voĉdonado kiu rezultis en tio, ke Kubo iĝis organizanto de IJK 2010. Mi informis kubanajn esperantistojn-organizantojn kaj anoncis la rezulton! De tiam, mi havis kontakton kun kubaj esperatistoj kaj ilia reprezentanto en ĉijara IJK 2009.

Du planitaj seminarioj por Aktivula Trejnado ne okazis, ĉar la subvencipetoj faritaj tiucele al Eŭropa Junulara Fonduso ne estis akceptita. Ni provas ĉi-jare refari ilin.

Dum pasintaj monatoj, mi sekvis la organizadon de IJK en Liberec. Kun ĉeforganizantoj mi klopodis organizi viziton al IJK-a urbo kaj IJK-ejoj, sed pro manko da tempo kaj vizaj problemoj, la vizito ne okazis! Tamen, la organizantoj tenas bonan kontakton kun TEJO kaj regule raportas. Mi partoprenas en organizado de TEJO-vespero dum la IJK.

Dum la pasinta jaro mi partoprenis ĉiujn

9 Centra Oficejo

raportas Paŭlo Ebermann, TEJO-volontulo

En la centra oficejo de UEA en Roterdamo troviĝas ankaŭ la oficejo de TEJO. Tie laboras volontulo, kiu ankaŭ loĝas tie (en apuda ĉambro en la sama etaĝo), kaj ricevas etan poŝmonon.

En la tempo de tiu ĉi jarraporto (IJK 2008 ĝis IJK 2009) aktivis en la Centra Oficejo eĉ tri volontuloj: unue Julia Noe (de 2007 ĝis mezo de novembro 2008), poste ekde komenco de novembro 2008 la volontulo estis Federico Faccio Peláez. Li pro personaj kialoj komence de majo 2009 anoncis ĉeson de sia volontul-periodo, kaj pro tio la Estraro urĝe serĉis iun, kiu povus transpreni. Troviĝis Paŭlo Ebermann, kiu do ekde 19a de majo estas la volontulo. (Federico enkondukis lin ĝis la 22a de majo en la laboron.) Paŭlo laŭplane restos nur ĝis septembro kaj tiam transdonos la postenon al posteulo.

Al la daŭraj taskoj de la volontuloj apartenas la daŭra kontakteblo (per retpoŝto, tujmesaĝiloj, telefono, paperpoŝto – kaj ke oni respondas al demandoj tiaj), la subteno de la Estraro en ties laboro, la protolado dum (retaj) estrarkunvenoj, ĝisdatigo de la retpaĝaro pri aranĝoj kaj aliaj informoj.

Krome aldoniĝas regule aliaj farendadoj. Laŭ petoj de landaj sekcioj ni sendas informmaterialon al ili. Kiam estas leteroj sendendaj de TEJO, tion ankaŭ kutime faras la volontulo el la Centra Oficejo – ekzemple la leterojn al la patronoj de TEJO, kaj al iamaj membroj, ke ili

remembru. Mi preparis la dokumentojn por la komitata kunsido (ekzemple kopiojn de tiu ĉi jarraporto).

Ne vere apartenanta al la taskaro, sed tamen tradicie, ni (kiel aliaj oficistoj kaj volontuloj de la Centra Oficejo) voĉlegas kaj registras artikolojn de Revuo Esperanto por blinduloj.

La TEJO-volontulo ankaŭ reprezentu TEJOn en esperantaj kaj neesperantaj aranĝoj. Dum tiu ĉi jaro tio estis IJK 2008 (Szombathely), konferenco pri dulingva edukado (Bruselo en decembro 2008), IS 2008/2009 (Biedenkopf), GEK/EEK 2009 (Herzberg), kaj finfine la IJK 2009 (Liberec). En la Eo-renkontiĝoj ni havis TEJO-budon, informis kaj kolektis donacojn kaj membrokotizojn, en la brusela konferenco Federico partoprenis la prelegojn kaj kontaktis esperantistojn kaj neesperantistajn interesigantojn.

Kompreneble ankaŭ dum la malfermaj tagoj de la Centra Oficejo de UEA en aŭtuno kaj printempo la TEJO-volontulo reprezentas TEJOn.

De mezo de 2008 ĝis komenco de 2009 la Centra Oficejo estis renovigita, kaj necesis translokigi la TEJO-oficejon al alia parto de la domo. Tio malplibonigis la labor- kaj loĝkondiĉojn por la daŭro de la renovigado, sed nun la stato estas pli bona ol antaŭe. Daŭre restas partoj de la arkivo por translokigi.

Kelkfoje jare necesas trakti subvencipetojn kaj subvenciraportojn, ĉefe ĉe YOUTH (la junulara programo de la Eŭropa Komisiono) kaj ĉe EYF (la Eŭropa Junulara Fonduso), sub gvido de la kasisto. Tio tre helpas al la financado de TEJO kaj ĝia agado.

10 Informado

raportas Felix Zesch, komisiito de la Komisiono pri Amaskomunikiloj kaj Publikaj Rilatoj (KAPRI)

Je la fino de mia oficperiodo, mi kun miksitaj sentoj reenrigardas. Al la plano krei profesiaspektan kaj altkvalitan aperon por la ekstera mondo, kiun mi esprimis je la komenco, laŭ mia takso mi ne multon kontribuis. Tamen kelkaj aferoj realiĝis:

La ideo havi 'Oftajn demandojn' pri la lingvopolitikaj pozicioj de TEJO estis bonvenigita de la Komitato kaj bone komencita, sed la metodo fini la laboron komencitan en IJK per vikio ne sukcesis. Bona rezulto estas, ke ni havas demandojn, kiuj povas pensigi ĉiujn Esperantistojn kaj krei viglajn diskutojn. La malbona rezulto estas, ke al la plimulto de la demandoj mankas konsentaj respondoj. La aktuala stato estas videbla je <http://tejo.org/vikio/LingvopolitikajPozicioj>.

Iugrade eksterofice kaj lige kun mia aktivado en la landa sekcio, mi verkis kvardekpaĝan broŝuron 'Kiel organizi Esperantokurson?', kiu entenas valorajn konsilojn por varbado kaj organizado de Esperantokursoj, nur mallonge traktante la instruadon mem.

<http://tinyurl.com/organiziEkurson>

Mi instigis la instalon de reta enketilo en la TEJO-paĝaro. Mi persone ĝis nun uzis ĝin por enketi la opiniojn de lernantoj pri okazintaj kursoj, sed facilas krei enketon pri la kvalito de Esperantoaranĝo, TEJO-aktivuloj aŭ io ajn, por eltrovi la sintenon de granda homgrupo. Esperantlingva versio de la enketilo bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas, sed la libera programo povas

simple esti tradukita. Se vi interesiĝas pri tio, anonciĝu ĉe mi.

<http://tejo.org/limesurvey/>

Por la landa sekcio mi kreis germanlingvan broŝuron pri la historio kaj ideo de Esperanto. Ĝi estas elŝutebla el la Reta Informada Centro (RIC) kaj povas ankaŭ servi al aliaj landaj sekcioj kiel modela broŝuro.

<http://tinyurl.com/GEJbroshuro2009>

Al la filmetaro 'Esperanto estas...' mi kontribuis organizante germanan voĉon kaj kontroligante la tradukitan tekston. Krome mi instigis enmeti la rete disponeblajn filmetojn en la paĝarojn de landaj sekcioj, instigo, kiun ĝis nun tro malmulte da landaj sekcioj sekvis.

<http://tinyurl.com/EOestasGermane>

Malgranda plibonigo estas, ke TEJO-rilataj kaj priarangaj retpaĝaroj de aranĝoj nun atingebblas mallonge kaj intuicie, ekzemple pere de tejo.org/ric kaj tejo.org/ijf.

Plano, kiun mi bedaŭrinde ĝis nun ne realigis, estas tiu de varbafiŝo por TEJO, kiun eblas pendigi en la akceptejo de aranĝoj, kie homoj aliĝas por TEJO.

La pliallogigo de la TEJO-aligilo estas plia nefinita tasko. Mi eltrovis, ke eblas malaboni la jarlibron, kiun multaj TEJO-membroj ne kutimas uzi, per simpla sciigo al la Centra Oficejo. Tio povus ŝpari paperon kaj sendokostojn. Krome la nuna aligilo estas iom konfuza kaj necesigas multe da klarigoj. Indas krei pli facile kompreneblan aligilon, kiu ebligas ankaŭ neabonon de la jarlibro.

Komence de mia oficerperiodo, mi kredis, ke kunlaborus du komisionanoj, sed tio finfine ne realiĝis. Ĉefe dank' al la klopodoj de la ĜenSek sekve kreiĝis la

emblemo kaj la adreskartoj:

En komisiono ni elektis inter diversaj proponoj de emblemoj kaj nun TEJO havas novan emblemon, kiu espereble iom pli longe vivos ol la aliaj kaj trovos pli da akcepto inter membroj kaj nemembroj ol la antaŭaj.

<http://www.tejo.org/eo/logotipo>

Por aspekti pli profesie en la ekstera apero de TEJO, estis kreitaj adreskartoj kun la kontaktdatumoj de la estraranoj.

Resume ŝajnas al mi, ke mi je la komenco de la oficerperiodo estis iom tro entuziasma kaj fine la aferoj kun la plej intima rilato al publika agado ne realiĝis pro mi, sed pro aliaj aktivuloj. Aliflanke mi kontribuis kelkajn valorajn alitemajn aferojn al la organizo. En la estonteco mi pretas same agadi kiel pasinte, ekstere de la Estraro aŭ sub gvido de estrarano pri publikaj rilatoj.

11 Pasporta Servo

raportas Gregor Hinker, Prezidanto

11.1 Pasporta Servo 1993–2008

Ekde 1993 Derk Ederveen (Nederlando) transprenis la kompiladon de Pasporta Servo. Tiu tasko komprenis komence la ĝisdatigon de la listo kaj la redaktado de la broŝuro.

Dum la jaroj la broŝuro fariĝis libro pli kaj pli dika:

- la nombro de gastigantoj kreskis
- aldoniĝis superrigardaj mapoj de pluraj regionoj

Derk efektivigis tiujn taskojn aŭtonome sendepende de la Estraroj de TEJO aŭ UEA, vendo okazis pere de UEA-libroservo kaj landaj sekcioj/perantoj. Ekde proksimume 2000 la defecitoj de PS

fariĝis konstantaj, ĉar la nombro de gastigantoj rajtantaj je senkosta eksemplero kreskis, male la nombro de vendataj eksempleroj stagnis. Tial, kaj la kostoj de presado kaj sendado superis la enspezojn de la vendoj.

Kontraŭstrategioj estis:

- serĉado de sponsoroj (mezsukcesa)
- PS-gastigantoj estis petataj pagi preso- k sendokostojn (proks. 5–7 EUR). Relative multaj akceptis tion, malgraŭ la malagrabla konflikto kun la ideo.

Ekde 2006 la defecitoj malkreskis kaj estis atingata pli malpli ekvilibro. La nombro de gastigantoj atingis sian maksimumon de 1300 gastigantoj en 2007.

Ekde 2007 Derk Ederveen klopodis komuniki kun la Estraro de TEJO pri eventuala pludono de la laboro, sed komence vane pro nefunkcia TEJO-Estraro ekde somero 2007. Dum UK 2008 li proponis:

- Starigon de efika elektronika datenbazo
- Paŝ-post-paŝan retiriĝon kaj pludonon de la respondecoj pri PS
- Sekve, la Komitato de TEJO dum KK 2008 Szombathely decidis ke
- PS estu debaze reformita
- Ĝia nova vizaĝo estu potenca retejo

La Estraro de TEJO estis taskigita efektivi tiun projekton.

11.2 Konceptigo de la projekto

En la konceptiga fazo okazis esploroj pri la evoluo de PS dum la pasintaj jaroj, la "konkurenco" kaj la vizioj de la sistemo.

- Observeblis ke ekde 2007 **malkreskis la nombro de gastigantoj**
- **La nombro de venditaj eksempleroj ankaŭ malkresketis**

- La eldono 2008 *suferis gravan problemon en la dissendo* kiu rezultis en perdo de supozeble pluraj centoj da ekzempleroj (la ekzaktan kaŭzon trovi ne eblis) kaj en certa perdo da simpatio kaj fido ĉe gastigantoj kiuj estis pagintaj por presado/sendo

- Inter junuloj estis pli kaj pli populara la **retaj gastigservoj** kiel *couch surfing* k. s. En kelkaj lokoj la nombro de grupiĝintaj Eo-parolantaj gastigantoj superis tiun de PS-gastigantoj

- Dum pasintaj jaroj plimultiĝis la demando pri pdf-versioj de la broŝuro ankaŭ inter uzantoj kiuj laŭkutime ne rajtis je ĝi

- Pro ŝanĝantaj vivokupo kaj loĝloko **Derk Ederveen ne plu pretis plue kunlabori** en la reform-projekto

- Post studo de la labor-procedo kaj informatika teknologio uzataj de Derk, estis konkludita ke **plusekvo PS en la malnova stilo ne eblis** pro tro kompleksa kaj temporaba procedo (ne eblintus kompili PS-n ĝis 2009)

Sekve, estis decido ke okazu konkurso inter programistoj proponantaj retprojektojn. Joop Kieft (Nederlando) estis nomumita komisiito pri PS kiel posteulo de Derk Ederveen.

11.3 Konkurso inter programistoj

En oktobro 2008 estis publikigita la alvoko al programistoj proponi projektojn. La plej gravaj postuloj (la tuta alvoko estas daŭre legebla en tejo.org) estis:

- Facila uzebleco
- Uzado de liberaj fontoj
- Dokumentado de la laboro por postaj ŝanĝoj

- Transdono de ĉiuj kopirajtoj al TEJO
- Reta datenbazo kun administra interfacio
- Uzant-interfacio alloga, sed laŭeble malkomplika

Venis 5 proponoj. Por plejeble bone taksi la proponojn ni starigis komisioneton en kiu membris la TEJO-estraranoj Rogener Pavinski, Gregor Hinker kaj Sergej Tyrin, krome Derk Ederveen, Joop Kieft kaj Bertilo Wennergren. Ĝi konkludis ke el la kvin proponoj tri ĝenerale plenumis la postulojn.

Estis elektita la propono de Joan Català el Hispanio. La argumentoj estis:

- Lia propono pruvis studon de aliaj retaj gastigservoj
- La propono baziĝis je la libera enhavmastrumsistemo (EMS) *Drupal* vaste uzata por Eo-paĝoj, kiu plenumus plej bone la postulon de posta ŝanĝeblo kaj libera fonto
- La postulata prezo estis modesta

11.4 Financado de la projekto

Paralele al la konkurso ni prezentis subvencipeton kadre de la programo kategorio B de la Eŭropa Junulara Fonduso (EYF) kaj en decembro 2008 eksciis pri subvencio de 4000 EUR. Aldone, s-ro Steve Cobb subtenis la projekton nome de la Drupal-fondaĵo.

11.5 Efektivigo de la projekto

sep, okt 2008 Akiro de la domajnnomo www.pasportaservo.org.

nov, dec 2008 PS-komisiito Joop Kieft plurfoje renkontis Derk Ederveen. Transdono de ĉiuj ciferecaj datenoj, klarigo de datenbazstrukturo ktp.

Kontraktigo de servilo

jan 2009 Joop vojaĝis al Hispanio kaj pasigis laborsemajnfino kun la programisto Joan Català, dum kiu estis starigita la strukturo de la datenbazo

jan-mar 2009 finaligo de la datenbazstrukturo. Kontraktigo de nova servilo pro datenbazproblemoj. Evoluoj de la uzantinterfacio. Eko de klopodoj transpreni www.pasportaservo.net de E@I
apr 2009 Roterdamo: kunveno de Joop, Joan, Gregor kaj TEJO-volontulo Federico en la CO por laborsemajnfino.

maj 2009 Publikigo de la unua fazo de PS: alvoko al gastigantoj enskribiĝi en la datenbazo

maj-jul 2009 Finaligaj laboroj pri uzantinterfacio. Prezentado al la Komitato de TEJO

IJK 2009 Publika prezentado

11.6 Stato de la projekto

La retejo estas principe pretita. **Papera eldono** estas planata. Dank' al la nova daŭre aktualiĝanta datenbazo ĝi ne plu devas aperi en la jara ritmo kaj simple validas dum unu jaro post eldono. Tamen, ni atendas malgrandan demandon kaj devas sekve adapti la eldonformaton.

11.7 Konkludoj

Konklude, oni povas konstati:

- En 2008 PS estis en ekzista minaco pro la rezigno de la kompilanto kaj netransdontaŭga sistemo/procedo
- La projekto 2.0 suferis pro malfruoj, sed principe sukcesis
- Finance, ni esperas je preskaŭ ekvilibra rezulto
- Tamen, la naturo de PS draste ŝanĝiĝos.

Plua gvidado de la projekto nepre necesas, ĉar antaŭvideble daŭros almenaŭ 1 jaron ĝis nova "ekvilibro".

12 TEJO Tutmonde raportas Marcos Cramer, komisiito pri redaktado de TEJO Tutmonde

TEJO Tutmonde (TT) daŭre aperis laŭ ĝia regula aperritmo ĉiun duan monaton. Plurfoje ĝi devis esti sendata aparte de *Kontakto* pro la malfruiĝoj ĉe *Kontakto*.

Ekde numero 2009:3 de TT estas nova rubriko 'Rekte el la Estraro', en kiu la Estraro de TEJO informas pri sia agado. Daŭre ekzistas la rubrikoj 'Esperanto en Interreto' kaj 'TEJO-membroj'.

En numero 2008:6 estis difinitaj lingvaj gvidlinioj por *TEJO Tutmonde*.

Lastatempe denove malpliigis kontribuoj al TT. Mi esperas ke la situacio baldaŭ pliboniĝos denove.

Komence de 2009 mi anoncis mian retiriĝon de redaktista posteno. Inter la kandidatoj kiuj reagis al la alvoko por kandidatiĝo, la Estraro elektis Nicola Ruggiero kiel mian posteulon.

13 Kontakto raportas Paŭlo Moĵajev, komisiito pri redaktado de Kontakto

En la jaro 2008 al *Kontakto* okazis kelkaj ŝanĝoj. Unue, ŝanĝiĝis la revua grafikisto: anstataŭ Ĵenja Zvereva, kiu redaktis kaj grafikis la revuon dum pli ol 5 jaroj, aŭtune 2008 la postenon de la grafikisto okupis brazilano Lucas Vignoli Reis. Li venis kun novaj ideoj rilate la aspekton de

la revuo kaj kelkajn ideojn li jam sukcesis realigi. La revuo do iomete ŝanĝis ankaŭ sian aspekton, kion la legantoj povis jam vidi en kelkaj numeroj, preparitaj dank' al la laboro de Lucas. Kelkaj pliaj ŝanĝoj estas planataj; interalie, estus interese ekscii la opinion de la legantoj pri la nova aspekto – tio multe helpus daŭre plibonigi la revuon laŭ la ĝusta direkto. En la jarkolekto 2008 aperis 5 numeroj de la revuo (unu estis duobla):

- 223 (2008:1) kun la ĉeftemo 'Neordinaraj hobiaj'
- 224 (2008:2) kun la ĉeftemo 'Teknologioj kaj scienco'
- 225 (2008:3) kun la ĉeftemo 'Edukado tra la mondo'
- 226-227 (2008:4-5) kun la ĉeftemo 'TEJO 70-jara'
- 228 (2008:6) kun la ĉeftemo 'Ĉu Mikelanĝelo estis surrealistoj?'

La unua numero (sen strikta temo) de la jaro 2009 nun (la 5an de julio) estas jam preskaŭ finpreparita - mi kaj Lucas faras la lastajn korektojn. La laboroj pri la preparado de la sekva numero estas jam komencitaj. Bedaŭrinde, komence de 2009 la aper-ritmo de la revuo rimarkeble malboniĝis, kio estis parte kaŭzita de la problemoj pri transpreno de la grafikistaj zorgoj fare de Lucas, parte de la kutima problemo pri kontribu-manko. La organizaj problemoj inter mi kaj la nova grafikisto estas jam solvitaj kaj ne plu devas influi la aperadon de la revuo, tamen la problemo pri manko de la kontribuoj estas daŭre aktuala. Mi alvokas ĉiujn interesitojn, ĉiujn ordinarnajn TEJO-anojn: verku por la revuo pri la temoj, kiuj vin interesas kaj verkigu viajn amikojn!

La temoj de la baldaŭaj numeroj aperas en ĉiu numero de la revuo, tamen ili ne celas limigi la verkemon kaj inspiron – kontribuu pri ĉio ajn: ju pli da diversaj temoj, des pli interesa estos la revuo!

Mi daure restas malferma al ĉiuj helpoj, proponoj kaj eĉ kritikoj, sed mi memorigas, ankaŭ, ke *Kontakto* estas nia komuna afero – kaj ĝia bonfarto grave dependas de la partopreno kaj aktiveco de ĝiaj legantoj kaj aŭtoroj.

14 TEJO-aktuale

raportas Julia Noe, komisiito pri redaktado de TEJO-aktuale

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO. TEJO-aktuale estas senpage abonebla, aperas 2-semajnririte kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj. Post paŭzo inter septembro 2007 kaj majo 2008 Julia Noe – tiama TEJO-volontulo – transprenis la redaktadon de TEJO-aktuale. TEJO-aktuale estas abonebla retpoŝte (uea.org/retlistoj) kaj legebla kaj printebla en sia retpaĝo (tejo.org/ta). Kontribuoj ĉiam estas bonvenaj per la retformularo en la retpaĝo aŭ retpoŝte al tejo-aktuale@tejo.org. TEJO-aktuale havas 778 retpoŝtajn abonantojn (laŭ 2009-06-20) kaj la paĝaro havas ĉirkaŭ 100 vizitantoj semajne.

15 Listo de mallongigoj

CO Centra Oficejo
EEK Eŭropa Esperanto Kongreso
EsKu Estrara Kunsido

FOjE Forumo de la Junularo Eŭropa
FS Faka Sekcio
GEK Germana Esperanto Kongreso
IJK Internacia Junulara Kongreso
ILEI Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
IS Internacia Seminario
KAPri Komisiono pri Amaskomunikilo kaj Publikaj Rilatoj
KER Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
LKK Loka Kongresa Komitato
LS Landa Sekcio
PS Pasporta Servo
RetEsKu Reta Estrara Kunsido
TA TEJO-aktuale
TEJO Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT TEJO Tutmonde
UEA Universala Esperanto-Asocio
UK Universala Kongreso

Kongresa rezolucio de la 65a Internacia Junulara Kongreso de TEJO 2009 en Liberec'

(Aprobata de la komitato de TEJO la 24an de julio 2009)

20 jarojn post la falo de la Fera Kurteno, la baroj inter la homoj ankoraŭ ne estas for: Falis la fizikaj kaj ideologiaj muroj, sed restis kaj kreskas aliaj baroj. Naciegoisma pensmaniero, nutrata de malnovaj ŝovinismo kaj antaŭjuĝoj, kaj lingvaj baroj malhelpas al interhoma kompreniĝo trans la limoj lingvaj, naciaj kaj popolaj.

En la urbo Liberec (Ĉeĥio) kunvenis 300 junuloj el 40 landoj okaze de la Internacia Junulara Kongreso. 300 junaj homoj plej diversaj laŭ nacio, religio, lingvo kaj politikaj opinioj pere de la Internacia Lingvo Esperanto diskutis la temon "Libereco 20 jarojn post la falo de la fera kurteno" kadre de diskutrondoj, prelegoj kaj seminarioj.

Dum unu semajno ni festis niajn kulturojn lokajn kaj internacian. Tiel ni spertis pliriĝigon de niaj propraj kulturaj horizontoj pere de interŝanĝo kaj interago. Ni spertis ankaŭ, ke kulturo kaj identeco estas homaj ecoj tro valoraj kaj kompleksaj por esti karakterizitaj nur per nacia aparteno. La partoprenantoj de la Internacia Junulara Kongreso travivis semajnon plenan de pliriĝigaj spertoj. Dum la semajno ni konatiĝis, amikiĝis, interdiskutis en internacia kaj plurkultura etoso, egalece kaj tute senzorge pri iu tielnomata "artefariteco" de nia Internacia Lingvo. Niaj amikaj ligoj, niaj kulturaj valoraĵoj, niaj komunaj sentoj ja estas veraj kaj vivaj.

Spertante unu semajnon kiel en monda vilaĝo, la partoprenantoj komunikis facile kaj egalece. Surbaze de diskutrondoj kaj seminarioj pri libereco evidentiĝis io dirinda kaj pripensinda: Ni konkludas, ke libereco havas multajn vizaĝojn kaj aspektojn. Libereco ankaŭ signifas ke ĉiu havas la rajton elekti kaj krei siajn proprajn identecojn – identecojn, kiuj reprezentas la individuon kaj ne nepre popolon aŭ nacion.

La Komitato de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

IJK 2011 en via lando!

www.tejo.org

**Limdato:
2009-12-15**

**Kandidatiĝu por
organizi la
67-an Internacian
Junularan Kongreson
en via lando!**

Lasttempaj IJK-j:

Zakopane Pollando	2005
Sarajevo Bosnio kaj Hercegovino	2006
Hanojo Vjetnamio	2007
Szombathely Hungario	2008
Liberec' Ĉeĥio	2009
Santa Cruz del Norte Kubo	2010
.... ?	2011

TEJO kunorganizas

kion TEJO faros?

- preparos kun vi buĝeton
- varbos por la evento
- provizos
 - retpaĝaron
 - aliĝsistemon
 - datenbazon
 - tasklistojn
 - vikion
- helpos pri subvencipetado

kion via teamo faros?

- trovos kaj traktos kun ejoj
- preparos programon
- surloke organizos
- librotenos
- traktos invitleterojn
- traktos lokajn kontaktojn
- metos informojn en la paĝaron

**Por pliaj
informoj
kontakto:**

lukasz@tejo.org

Łukasz Żebrowski

Organiza teamo

TEJO:

- administrado
- financa planado
- informado
- varbado

Loka teamo:

- kelkaj kernaj organizantoj
- helpantoj



Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de *UEA, la Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturalan riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

TTT-ejo: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176

NL-3015 BJ Rotterdam

Nederlando

Tel.: (010) 436 1044

Faksilo: (010) 436 1751,

Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

- Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo
- Oleksandra KOVYAZINA (Informado, unua Vicprezidanto)
ul Botkinskaja 12/15, 98635 Jalta, Ukrainio

- Paulína KOŽUCHOVÁ (Ĝenerala Sekretario)
Vrančovičova 59, 841 03 Bratislava 47, Slovakio
- Irmína SZUSTAK (Landa Agado, Vicprezidanto)
Targowa 39/73, 03-728 Warszawa, Pollando

- Sergej TYRIN (Kasisto)
P.O.K. 15092, 84120 Beer-Ŝeva, Israelo
- Łukasz Maciej ŻEBROWSKI (Kongresoj, Seminarioj, Aktivula Trejnado, Vicprezidanto)
ul. Kminkowa 7, 04-991 Warszawa, Pollando

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon havi blogon ĉe tejo.org

- eblon envolviĝi en interesa kaj internacia agado
- Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!